

2) **Preporcioj de unuoj**

La decida rezulto de la diskutado estas, ke la prepozicio »po« ne taŭgas por esprimi la frakci-strekon de formuloj kiel

$$v = 100 \text{ km/h} ; f = 50 \text{ c/s} ; p = 3 \text{ kp/cm}^2.$$

Estus ja kontentige por ĝermanlingvanoj, uzi la prepozicion »je«, ekz-e »100 kilometroj je horo«, tamen tia slovo ne estas rekomendinda, ĉar laŭ la Fundamento »je« estu rezervita nur por tute nedifinitaj okazoj, kaj tio ne okazas, se oni esprimas matematikajn formulojn.

La prepozicion »po« oni povus uzi laŭ ĝia fundamenta senco nur prefikse:

labori po-ses horojn tage; veturi po-cent kilometrojn hore; sed nekorekta estas la prepozicio »po«, malgraŭ la ekzemploj de Plena Vortaro, en okazoj kiel posekunda rapideco, pomonata salajro ktp., ĉar la distribuataĵo estas ja la rapideco aŭ la salajro, ne la sekundoj aŭ la monatoj.

Ni tute pravas uzi ankaŭ la adverbajn formojn:

100 kilometroj hore; 50 cikloj sekunde; 3 kilopondoj kvadratcentimetre.

Tamen por koncize esprimi la frakci-strekon en formuloj, Kalocsay rekomendas anstataŭ »je«, kiun Waringhien iam proponis plejparte por ne tro ĝoni ĝermanojn, iom ampleksigi la signifon de la esperantlingva »per«, kaj sekve uzi laŭ la internacia kutimo, t. e.:

rapideco de 100 kilometroj per horo; frekvenco de 50 cikloj per sekundo; premo de 3 kilopondoj per kvadratcentimetro; aŭ: la perhora rapideco estas 100 km; permonata salajro; perloĝanta konsumo; ktp.

Tiu esprimmaniero estas la plej oportuna, ĉar ĝi efektive retrovas la internacian dirmanieron, bazitan sur la latina (per secundum ktp.).

Restas decidi pri la esprimo de formuloj, en kiuj la numeratoro de la frakcio ankaŭ estas frakcio, ekz-e la formulo de la akcelo:

$$g = 9,81 \text{ m/s/s} = 9,81 \text{ m/s}^2.$$

Se oni volas uzi »po«, ĉi tiu prepozicio estus uzebla nur antaŭ la »distribuita« afero, t. e. la metroj; do oni povus diri »po 9,81 metroj sekunde en sekundo«.

Tamen plej korekte estas diri, se oni volas substreki la duoble-frakcian karakteron de la formulo:

9,81 metroj persekunde en sekundo
kaj alikaze pli simple:

9,81 metroj per kvadratsekundo.

R. HAFERKORN

S-ro Eskil Svane el Kopenhago ĵus fariĝis **Master of Comparative Jurisprudence** (Magistro pri Kompara Juriscienco) ĉe New York University rezulte de sia disertaĵo »The Conclusion of Contracts«, skribta en la angla lingvo kun resumo en la lingvo internacia. S-ro Svane afable permesis al **Scienca Revuo** publikigi la resumon, kiu sekvas ĉi-sube:

347.44:(48)(489)(73)

FARADO DE KONTRAKTOJ

(Eskil Svane, Kopenhago)

I. Pri juro en Skandinavio

Skandinavaj juristoj studentaj en Usono verŝajne surpriziĝos konstatante, ke iliaj usonaj kolegoj preskaŭ ĉiam parolas pri nur du juraj sistemoj, kvazaŭ neniuj aliaj ekzistus: pri la angla-usona juro konstruita sur juĝaj decidoj kaj pri la juro de kontinenta Eŭropo bazita sur civilaj kodoj. Tiel parolante oni forgesas, ke ja ekzistas aliaj juraj sistemoj preter la du menciitaj, ekzemple tiu de Skandinavio, kiu ĉefe baziĝas sur longdaŭra praktikado kaj popolaj kutimoj, kaj kiu estas distingebla kaj de la juĝist-kreita juro kaj de la juro kodigita.

Interalie pro la geografia situo de Skandinavio ĝian juron ne multe influas la angla, nek la roma-civila juraj principoj. Tio estas klare videbla ne nur en la frutempaj iom primitivaj leĝokolektoj de la diversaj skandinavaj provincoj, sed ankaŭ en la tre evoluintaj dan-norvega kaj sveda leĝaroj de la 17a kaj 18a jarcentoj. La skandinavaj leĝokolektoj neniel estis ellaboritaj kodoj startigaj sur ĝeneralaj aŭ abstraktaj juraj principoj kiel la kodoj de la centra Eŭropo, sed pli ĝuste ili konsistis el are de apartaj leĝoj kaj reguloj en diversaj sferoj de la praktika vivo. Ankaŭ hodiaŭ en Skandinavio ni ne klopodas kodigi nian juron en sisteman tujan, sed anstataŭe ni nur preskribas esencajn regulojn en specialaj kampoj, lasante al niaj juĝistoj la taskon, ke ili per siaj decidoj detale evoluigu la juron de la koncerna kampo.

De la lasta duono de la pasinta jarcento tiajn leĝojn kreis en kunlaboro Danlando, Norvegio kaj Svedio, kaj de la unua mondmilito ankaŭ Finnlando kaj Islando partoprenas la kunlaboron. La skandinavaj landoj hodiaŭ posedas identajn aŭ preskaŭidentajn leĝojn pri la sekvantaj temoj:

Kontraktoj, vendo kaj aĉeto, seriopaga aĉeto, perkomisiistaj vendoj, pagpromesaj notoj, kambioj, ĉekoj, asekuro, kopirajto, patentoj, fabrikmarkoj, neplenaĝuloj kaj subkuratoreco, geedziĝo separo kaj eksedziĝo, propreco geedza, rilatoj inter gepartoj kaj infanoj, adopto kaj ŝtataneco.

La kaŭzoj, ke la verkinto decidis kompari la faradon de simplaj kontraktoj en dana kaj usona juroj, estas ĉefe tiuj du: (1) Ke la juraj reguloj de la angla-usona kaj dana sistemoj tre diferencas unu de la alia, ĉar en la du sistemoj oni eliras de malsamaj principoj por atingi la solvon de la problemoj, kiujn starigas kontraktado. (2) Ke kontraktado donos bonan ekzemplon de unuforma juro skandinava, kaj tial la leganto povas fidi, ke reguloj, egalaj al tiuj aplikataj en Danlando rilate al la kontraktado, estas aplikeblaj en Skandinavio kiel tuto.

II. Dana juro

La danaj reguloj pri la kontraktado estas troveblaj en la Leĝo pri kontraktoj de 1917, kiu baziĝas sur la juraj principoj pli frue evoluigitaj. En sia unua paragrafo la leĝo esprimas la gravan bazan principon, ke oferto kaj respondoj al oferto (ĉu akcepto, ĉu malakcepto) estas devigaj rilate al la farinto. Tiu principo, laŭ kiu promesanto per sia nura promeso prenas devojn sur sin, plene kontraŭas la ĝeneralan koncepton pri la kontraktado en Usono, kie devo povas esti kreita nur per la interŝanĝo de promeso kaj akcepto. La principon kompletigas § 7 de la leĝo dirante, ke ofertoj aŭ respondoj estas revokeblaj de la ofertanto aŭ la respondanto nur, se la revoko atingas partion — la ofertoricevanton (akceptanton) en la okazo de ofertoj, la ofertanton en la kazo de respondoj, ĉu pozitivaj, ĉu negativaj — antaŭ ol la tempo aŭ je la sama tempo, kiam tiu alia partio ekscias pri la farado de la oferto aŭ respondo. Alivorte, tiu partio povas fidi la oferton aŭ la respondon, ĉar revoko ricevita post lia ekscio pri la oferto aŭ respondo estas senefika kaj sekve ignorebla.

Tamen, ne estas necese, ke la alia partio efektive eksciu pri la revoko ricevita, ĉar se la efiko de la revoko dependus de la fakto, ĉu la alia partio vere ekscias pri ĝi aŭ ne, ja estus facile por li intence ne informiĝi pri la enhavo de mesaĝo ricevita tiel ĝin senefikigante, se li suspektas, ke ĝi estas revoko.

Mallonge, promeso per kiu oni metas sur sin mem devojn pri faro aŭ nefaro, ekvalidas ekde la momento, kiam la alia partio ekscias pri ĝi; sed averto per kiu oni metas sur sian kontraŭn partion devojn, (kiel ekzemple per revoko aŭ akcepto), ekvalidas jam ekde la momento, kiam ĝi estas ricevita.

Se la ofertanto postulas akcepton de la alia partio, estas necese ke la akcepto atingu lin antaŭ ol la fino de la tempospaco de li fiksita (§2). Se la ofertanto ne fiksas tian tempodaŭron, la akcepto atingu lin antaŭ la fino de laŭrezona tempospaco. Por fiksi tian tempospacon oni devas taksu la temon kaj la komplikecon de la kontrakto farota kaj la manieron, kiun elektis la oferanto por informi la akceptanton pri la oferto (§3). La leĝo postulas nur, ke la akcepto — kiel aliaj avertoj — estu ricevita de la ofertanto sufiĉe frutempe, ne ke li eksciu pri ĝi; alie ofertanto kiu bedaŭras faritan oferton povus malebligi la kreon de la kontrakto ne informigante pri mesaĝo ricevita, kiu laŭ lia suspekto estas akcepto.

Akcepto plej ofte entenas ne nur elementon de averto, sed ankaŭ elementon de promeso, ĉar plej ofte la akceptanto per sia akcepto ja samtempe promesas rekompencan al la ofertanto por la servo aŭ varo proponita al li. Se la akceptanto bedaŭras sian akcepton, li povas revoki ĝin kiel aliajn promesojn, se la revoko atingas la ofertanton ne pli malfrue ol tiu ekscias pri la akcepto (§ 7).

Se la akcepto atingas la ofertanton post la fino de la koncerna tempospaco (malfrua akcepto), la ofertanto povas ĝin tute ignori, ĉar malfrua akcepto funkcias kiel nova oferto, kiun povas laŭplaĉe atenti aŭ malatenti la antaŭa ofertanto. Tamen, se la akceptanto erare kredas, ke lia akcepto estos atinginta la ofertanton sufiĉe frue por esti efika, kaj se la ofertanto ekkonas tion, li devas informi la akceptanton, ke li ignoras la akcepton kiel malfruan; se la ofertanto ne donas tiun informon al la akceptanto, la kontrakto ekvalidas malgraŭ la akcepto malfrua (§4). Malakcepto de oferto kaŭzas ĝian nuligon, eĉ se la tempo fiksita por la akcepto ankoraŭ ne pasis (§ 5). Revoko de malakcepto ekvalidas kiam ricevita laŭ la regulo en § 7.

La akcepto devas esti konforma al la kondiĉoj de la oferto, ĉar neniu kontrakto rezultas el nekonforma akcepto; tian akcepton la ofertanto povas konsideri kiel novan oferton, kiun li laŭplaĉe povas akcepti. Aliflanke, se la ofertanto komprenas, ke la akceptanto malprave kredas, ke la akcepto konformas al la oferto, la ofertanto devas sciigi la akceptanton, ke li ignoras lian nekonforman akcepton. Se la akceptanto ne tiel agas, kontrakto ekvalidas laŭ la kondiĉoj entenataj en la nekonforma akcepto (§ 6).

La dana juro ne entenas aliajn postulojn necesajn por fari validan kontrakton, nek la elementon de kaŭzo («causa») de la civila jursistemo, nek la rekompencan («consideration») de la angla-usona juro. Alivorte,

en Danlando la juro insistas, ke promesanto plenumu sian promeson (ankaŭ promesojn pri donacoj).

Nur en esceptaj okazoj povas promesanto malatenti promeson faritan, nome se la alia partio scias aŭ devus scii, ke li mem aŭ aliulo kaŭzis la faradon de la promeso per kontraŭleĝa devigo, trompo, ekspluato aŭ alia senhonesto ago. Cetere, la danaj juĝistoj per siaj decidoj — do ne temas pri skribaj reguloj — kreis doktrinon pri eraraj kaj ŝanĝitaj antaŭsupozoj, Laŭ tiu doktrino estas eble en tre esceptaj kazoj liberigi promesanton de lia promeso, se montriĝas, ke li faris sian promeson surbaze de certaj antaŭsupozoj, kiuj estis aŭ fariĝis esence malsimilaj al tiuj, je kiuj li laŭrezone kalkulis. Tiuj antaŭsupozoj devas — antaŭvideble al la promesricevanto — esti konsiderataj kiel gravegaj, eĉ decidigaj por la promesanto, kaj se krome estas konsiderate juste meti la riskon por la senefektivigo de la promeso sur la promesricevanton, oni povas senvalidigi la promeson. Ekzemple, kiam heredanto promesas ke li respektos testamenton formale nevalidan, enhavantan malavantaĝojn al li, kaj se montriĝos, ke liaj kunheredantoj farinte similan promeson tamen respektos nur la parton de la testamento avantaĝan al ili, tiam la heredanto povas pledi, ke li antaŭsupozis, ke la testamento estos respektata kiel tuto, kaj ĉar tio ne okazis, lia promeso ne estas plenumenda, kaj sekve ĉiuj heredantoj ricevos laŭ la ordonoj de la leĝo kaj ne de la koncerna (nevalida) testamento.

III. La juro en U. S. A.

A. Oferto kaj akcepto

La regulojn pri kontraktado en Usono preskaŭ ĉiun konstruis anglaj kaj usonaj juĝistoj per kaj surbaze de siaj decidoj dum la jarcentoj. Por dana juristo estas stranga la fakto, ke ĝis ĝia akcepto nura promeso ne estas plenumenda de la promesanto. Tial ofertanto povas ĉiam revoki sian oferton, se la revoko atingas la akceptanton antaŭ ties akcepto, eĉ se la ofertanto deklaris la oferton nerevokebla dum certa tempodaŭro. Tiun regulon rezultigas la doktrino pri rekompenco, laŭ kiu promeso sen kontraŭvaloro ne estas valida.

Tamen por protekti la ofertoricevonton kontraŭ neatendata revoko la kortumoj ofte rifuzas apliki la principon pri revokebleco, ekzemple ofte en la kazo de oferto por unupromesa kontrakto (t. e. oferto, kiun oni povas akcepti per la ago petita, kontraŭe al oferto por dupromesa kontrakto, kiun karakterizas la fakto, ke la ofertanto petas de la alia partio ne agadon, sed promeson ke li faros la agon). Se la aganto en unupromesa kontrakto jam finis gravan parton de la koncerna ago, la ofertanto ne plu povas revoki la oferton kaj tiel malebligi la kontrakton, ĉar alie la

ofertoricevanto estus vane farinta la jam faritan laboron. En aliaj kazoj estas eble por la juĝisto interpreti unupromesan kontrakton kiel efektive dupromesan kaj trovi en la komencita agado de la ofertoricevanto implicitan akcepton de la oferto kaj lian promeson plene plenumi la kontrakton; ankaŭ tia interpreto — fikcia kia ĝi estas — malebligas la revokon de ofertoj.

Por eviti tiajn fikciajn interpretojn kaj konstruojn pluraj ŝtatoj en Usono per leĝo decidis, ke ĉiuj skribaj ofertoj subskribitaj de la ofertanto kaj deklarataj ke li ne revokos ilin estas nerevokeblaj.

Kiel en la dana juro la akcepto kutime ekvalidas je ĝia ricevo de la ofertanto. Tamen en la okazo de kontraktado per korespondado, la kontrakto estas farita laŭ la malnova angla juĝo jam je la forsendo de la akcepta letero de la akceptanto. Sed tiun strangan regulon la ofertanto ja ofte povas eviti kondiĉante la faradon de la kontrakto per efektiva ricevo de la akcepto.

Simile kiel en la dana juro oni konsideras malfruan akcepton nova oferto; tamen en la usona juro ĝenerale ne estas necese, ke la (unua) ofertanto avertu la akceptanton, ke tiu malprave kredis, ke la akcepto estos atinginta la ofertanton sufiĉe frutempe — la akceptanto mem portu la riskon de sia malfruiĝo! Ankaŭ nekonforma akcepto estas konsiderata nova oferto; se la akceptanto erare kredas, ke la akcepto estas konforma al la oferto, la usona juro — kiel la dana — postulas, ke la ofertanto avertu la akceptanton, ĉar en ĉiu tiu kazo verŝajne li mem (la ofertanto) per neklaraj kondiĉoj en sia oferto kaŭzis la miskomprenon de la akceptanto.

Kiel en la dana juro malakcepto de oferto ekvalidas, kiam ĝi estas ricevita de la ofertanto (kontraŭe al akcepto per korespondado).

B. Rekompenco

Eĉ se ĉiuj supre menciitaj postuloj estas kontentigitaj, kontrakto rezultas laŭ la angla-usona doktrino pri rekompenco nur, se akompanas la promeson kroma faktoro, intereŝanĝo de valoroj, nomita »consideration« (rekompenco). Tiu rekompenco devas konsisti el ago, preterlaso aŭ kontraŭpromeso farita intereŝanĝe por la promeso (de la ofertanto) kiel rezulto de interkonsento kaj kaŭzanta **utilon al la promesanto** aŭ **malutilon al la promesricevanto**. Estas konsekvenco de tiu doktrino, ke promeso ne subtenata per rekompenco ne estas per si mem plenumenda kiel ekzemple donacpromeso aŭ, kiel ni vidis, oferto. Tiun doktrinon pri rekompenco, rigidan kaj strangan al eksterlandaj juristoj, oni povas klarigi nur en historia perspektivo (kion la verkinto ne klopodas fari en ĉi tiu resumo).

Por ilustrati la doktrinon mi citu nur kelkajn malmultajn juĝojn. Ekzemplo de rekompenco konsistanta el ago: Onklo promesis al nevo \$ 5000, se li studos en universitato. Nevo studis, kaj onklo devis pagi. Ek-

zemplo de preterlaso: Onklo promesis al nevo \$ 500, se li ne fumos ĝis sia 21-a jaro. Nevo ne fumis, kaj la monsumo estis postulebla. Tiu ekzemplo montras ankaŭ, ke nenial etas necese, ke la rekompenco havu financan valoron egalan al la promeso.

Rilate al dupromesaj kontraktoj, unu promeso estas rekompenco por la alia, kondice ke la promesoj kaŭzas utilon al la promesanto aŭ malutilon al la promesricevanto. Tial, se oni promesas agon aŭ preterlason, kiun oni jam jure ŝuldas al la promesricevanto, tiu promeso kaŭzas utilon nek malutilon kaj sekve — laŭ la doktrino pri la »jam ekzistanta devo« — tiu promeso ne povas validigi kontraŭn promeson faritan de la promesricevanto.

Tiu doktrino pri la jam ekzistanta devo malebligas ekzemple la validecon de promeso al servisto aŭ laboristo pri pli alta salajro kaj simile la validecon de promeso de kreditoro al ŝuldanto, ke li kontentigos sin per la ricevo de parto de la ŝuldo pagota; sekve — malgraŭ la promesoj — la laboristo ne povas postuli la ekstran pagon por siaj servoj se ĝi estas rifuzata, kaj la kreditoro povas ankoraŭ postuli pagon de la tuta ŝuldo. La doktrino estas tre kritikata, kaj la tribunaloj ofte evitas ĝian aplikon per interpretado fikcia. Ekzemple oni povas per streĉita interpreto trovi promeson pri pli alta salajro kiel nuligon de la antaŭa kontrakto kaj samtempan faradon de alia nova, kiu ja nun povas esti valida, ĉar ĝi konsistas el du novaj promesoj ne jam ekzistantaj. Cetere, se oni povas trovi ke la laboro por kiu ekstra pago estas promesita, estas eĉ nur iomete ŝanĝita, oni ne plu povas paroli pri jam ekzistanta devo, ĉar la devo ja estas iomete aliigita, kaj sekve la kontrakto estas savita. Simile, se kreditoro ne nur promesas al ŝuldanto, ke li nuligos parton de lia ŝuldo sed samtempe ankaŭ petas pagon ekzemple antaŭ la pagalimdato aŭ en alia loko ol en tiu pri kiu la partioj antaŭe interkonsentis, li tiel ŝanĝas la jam ekzistantan devon de la ŝuldanto, ke lia promeso (tiu de la kreditoro) povas ekvalidi. Estu menciite, ke likvido de ŝuldo per pagakordiĝo inter ŝuldanto, kaj liaj kreditoroj validas, ĉar la kreditoroj ne nur promesas al la ŝuldanto, ke ili akceptos nuran parton de lia ŝuldo al ili kiel kontentigan, sed krome ili tion promesas ankaŭ unu al la alia.

La doktrino pri la jam ekzistanta devo montriĝis tiel nesufiĉa por la praktika vivo, ke pluraj ŝtatoj usonaj abolis ĝin, deklarante ke skribaj promesoj ŝanĝantaj aŭ nuligantaj kontraktojn aŭ aliajn devojn estas validaj eĉ sen rekompenco.

Kvankam, do, promeso fari tion, kion la promesanto jam ŝuldas al la promesricevanto ne konsistigas rekompencan, kiu povas validigi kontraŭpromeson de la promesricevanto, tamen promeso plenumi tion jam jure ŝuldatan al la promesricevanto ofte ne bezonas novan rekompencan por ekvalidi laŭ la doktrino pri »pasinta rekompenco«. Tiu doktrino fakte estas artifiko por povi validigi promesojn ne respektante la rigidajn

regulojn de la »vera« doktrino pri rekompenco, kaj tial la doktrino pri pasinta rekompenco efektive estas escepto de la doktrino de rekompenco.

Laŭ la doktrino pri pasinta rekompenco, promeso de ŝuldanto ke li pagos sian ŝuldon — ĉu postuleblan, ĉu preskriptitan estas valida kaj komencas novan tempopason preskriptigan; sed la ŝuldo de tiu persono ne estas pasinta rekompenco por la promeso de aliu, ke li pagos la ŝuldon de la ŝuldanto, kaj tial ekestis la stranga regulo, ke la promeso de kaŭcio por ŝuldanto ne estas per si mem valida en Usono.

Laŭ la doktrino pri pasinta rekompenco ekvalidas sen »vera« rekompenco ankaŭ nova promeso plenumi antaŭan promeson nuligeblan pro la tiama neplenaĝo de la promesanto aŭ pro devigo aŭ trompo farita kontraŭ li. Simile estas valida promeso pagi por servo jam plenumita por la promesanto, kondiĉe ke la servinto plenumis responde al la peto de la promesanto. Aliflanke, ĝenerale oni ne konsideras antaŭan devon nur moralan, sed ne juran, pasinta rekompenco, kiu povas validigi postan promeson plenumi tion, kion la morala devo postulas. Do, se persono savas la vivon de alia, kaj la dankema savito promesas al la savinto gratifon pro lia herca ago, la gratifo tamen ne estas postulebla.

Fine alia grava escepto de la doktrino pri rekompenco estu klarigata — tiu de la doktrino pri promesa ŝtopo (»promissory estoppel«). Laŭ tiu doktrino promeso estas plenumenda, kvankam ekzistas nenia rekompenco, se la promesricevanto laŭrezone fidis la promeson kaj sekve agis — aŭ preter lasis agi tiel, ke li suferos gravegan malutilon kaj perdon, se la promeso ne estos plenumita. Kelkfoje oni diris, ke la promesanto estas ŝtopata (barata, malpermesata) nei la ekziston de rekompenco, aŭ ke li estas ŝtopata nei sian responcon. Tamen, tio estas fikcia kaj komplika, kaj plejofte nuntempe oni simple diras, ke en tiaj kazoj promeso validas sen rekompenco. Ekzemple, kiam ŝuldanto promesas, ke li nepre ne uzos preskripton kiel defendon en eventuala proceso tiel kaŭzante ke lia kreditoro ne renovigas la ŝuldon, tiam la promeso estos konsiderata valida, kaj la kreditoro ne perdos sian rajton kontraŭ la ŝuldanto kiel kutime je la fino de la tempodaŭro preskriptiga.

IV. Konkludo

Por pli bone povi illustri la regulojn koncerne la faradon de kontraktoj, juraj verkistoj kreis du teoriojn tiurilate, la »interkonsentan teorion« kaj la »promesan teorion«. Laŭ la interkonsenta teorio nura promeso ne povas krei devojn kaj rajton, sed krome akcepto estas ĉiam necesa. Laŭ la promesa teorio la promeso surmetas sur la promesanton devojn tuj kiam la promesricevanto ekscias pri la promeso, sed la promesanto po-

vas kondiĉi per la akcepto de la promesricevanto la daŭran ekziston de la devoj kreitaj. Nun, en la perspektivo de la du »puraj« teoriaj principoj oni povas resumi la juron pri kontraktado en Danlando kaj Usono tiel:

La baza principo en la dana juro estas, ke promesoj estas plenumendaj; nur se specialaj kromaj faktoroj kiel trompo aŭ ekspluato estas pruvitaj, oni povas liberigi la promesanton de lia promeso. Male, en Usono promeso estas nur plenumenda, se ĉeestas kromaj faktoroj kiel akcepto kaj rekompenco. Alivorte, dana juro principe baziĝas sur la promesa teorio, sed usona juro sur la interkonsenta teorio — spicita per la doktrino pri rekompenco.

Laŭ la opinio de la verkinto la danaj reguloj pli bone kontentigas la bezonojn de la komerca vivo de la hodiaŭo. Estas utile por la komerco, ke ofertoricevanto povas fidi je la oferto ricevita kaj serioze esplori la eblecojn por negocado surbaze de la oferto, ne timante ke ĝin subite revokas la ofertanto laŭplaĉe kiam ajn. Kaj se ofertoricevantoj estas protektataj kontraŭ la revoko de ofertoj, ili verŝajne emas rekompenci la promesantojn pli malavare, ol kiam la timo pri la subita revoko de la oferto necesigas ĝian tro rapidan akcepton. Cetere estas normale plenumi oniajn promesojn, kaj la juro devas subteni tion, kion la scio konsideras normala kaj justa.

Sed kial do usona juro ne evoluigis similajn regulojn kiel la danajn, avantaĝajn al la moderna komercado? La respondo verŝajne estas, ke tion malhelpis la doktrino pri rekompenco, ĉar la doktrino ja kondiĉas la validecon de promeso per interkonsento pri kontraŭvaloro por ĝi, kaj tia kondiĉo implicas ja akcepton de la promeso; sendube tial usona juro principe restas surbaze de la interkonsenta teorio. Tamen per juĝaj decidoj kaj leĝofarado la usona juro klopodas superruzi kaj la interkonsentan teorion kaj la doktrinon pri rekompenco.

Unue, kiel klarigite, usonaj tribunaloj malpermesas la revokon de oferto por unupromesa kontrakto, aŭ kiam la promesricevanto jam finis gravan parton de la laboro petita, aŭ eĉ kiam li nur komencis la agadon, se tiu agado povas esti interpretata fikcie kiel akcepto de la oferto farita. En la kazo de dupromesaj kontraktoj, se la ofertoricevanto fidis je la oferto kaj agas konforme, eĉ ne formale akceptinte, la ofertanto ofte estas ŝtopata revoki sian oferton. Fine, la leĝoj en pluraj usonaj ŝtatoj malpermesas la revokon de certaj skribaj ofertoj.

La supre priskribitajn regulojn mallongigantajn la periodon dum kiam promesanto povas revoki sian promeson, aŭ tute malpermesantajn revokon, la verkinto konsideras klopodon de usona juro por alproksimiĝi al la promesa teorio, kiu ja ne toleras revokon de oferto (post kiam la ofertoricevanto ekscias pri ĝi) dum la promesita aŭ laŭrezona tempodaŭro.

Rilate al kontraktado per korespondado la akcepto ekvalidas jam ekde forsendo. Tiu regulo estas defendebla nur kiel mallongiganta la periodon de revokebleco de ofertoj, tiel iusence strebante al la promesa teorio; sed cetere ĝi estas kritikinda, ĉar oni tiris el ĝi la malfeliĉan konsekvencon, ke akcepto ekvalidas ekde ekspedo, eĉ se la ofertanto neniam estas ricevinta la akcepton kaj tiel tute ne povas scii, ke la kontrakto estas farita. Plie, se la akceptanto jam forsendis sian akcepton, sed poste bedaŭras tion kaj tial sendas (eksprese) malakcepton kiu preterpasas la akcepton kaj regulon pri ekvalido je forsendo. Tial tiu regulo, kies nura ekzistaro estas malnova angla juĝo, estas sufiĉe konfuziga.

La interkonsentan teorion kaj la doktrinon pri rekompenco oni kutime defendas, ĉar tiuj du instigas kontraktantojn respekti siajn interkonsentojn. Tio estas bona, sed apenaŭ sufiĉe bona en la hodiaŭo, kiam estas bezonata respekto ne nur al interkonsentoj, sed la promesoj. Tial, kiel ni vidis, la usona juro ne nur klopodas limigi la konsekvencojn de la interkonsenta teorio, sed ĝi kreis ankaŭ multajn esceptojn de la doktrino pri rekompenco.

Oni penis defendi la doktrinon pri rekompenco ankaŭ de alia flanko, nome kiel garantion de la justeco de unuopaj kontraktoj. Tiu garantio, tamen, ŝajnas ne perfekta.

La verkinto montris, ke la doktrino kaj ĝia subdoktrino pri la jam ekzistanta devo malebligas la validecon de promeso de kreditoro, ke li kontentigos sin per la ricevo de nur parto de monsumo ŝuldata al li, ĉar lia promeso estas senrekompensa. Tiel la doktrino laŭdire garantias, ke ŝuldanto-minacante ke li pagos aŭ parton de la ŝuldo aŭ nenion — ne povas devigi la kreditoron kontentiĝi pri nura partopago. Same, ne estas valida promeso senrekompensa pri pli alta pago al dungito; ĉar alie tiu ja povus minaci ke li ne faros la laboron interkonsentitan, se li ne ricevos pli altan salajron.

Tamen ne konsiderante la fakton, ke kutime ne estas la kreditoro aŭ la mastro kiu estas la malforta partio, kaj ankaŭ ignorante la fakton, ke en la praktika vivo kreditoro ofte preferas tujan pagon de parto de sia bonhavo ol estonta ebleco pri la pago de la tutaĵo, oni povus argumenti, ke oni tre ofte povas eviti tiun garantion de justeco, kiun laŭsupoze konsistigas la doktrino pri rekompenco, ĉar la partioj ja simple povas aŭ formale nuligi la jam ekzistantajn devojn aŭ ilin iomete ŝanĝi, tiel kreante validan, eĉ se ne realan rekompencan por la koncerna promeso de la kreditoro aŭ la mastro. Ĉar la doktrino ne kapablas funkcii kiel garantio kaj ĉar ĝi estas en multaj kazoj eĉ maljusta, ne estas mirige, ke usona juro per juĝa interpretado aŭ per leĝoj grandparte nuligis la doktrinon.

Laŭ la dana juro promesoj pri ekstra pago aŭ pri parta aŭ tuta liberigo de ŝuldo estas plenumendaj kiel ĉiu alia promeso; nur se devigo

aŭ trompo k. s. estas pruvita aŭ se la doktrino pri antaŭsupozoj povas esti aplikata, oni povas liberigi la promesanton de lia promeso.

Fine estu menciata la embaraso, kiu ne malofte sekvas el la neplenumendeco de promesoj kaj el tiu escepto de la doktrino pri rekompenco, kiun oni nomas pasinta rekompenco: Ofte ja ne estas eble, kaj certe pli ofte ne, estas juste, distingi inter la juraj kaj moralaj devoj de la promesanto, el kiuj nur la juraj devoj povas validigi lian postan promeson ilin plenumi. Tiam embarson ne konas dana juro, laŭ kiu ĉiuj promesoj estas plenumendaj, senkonsidere ĉu la motivo por fari la promeson estas jura aŭ morala.

Ne kaŝante la bazajn diferencojn inter la dana kaj usona juroj, la verkinto klopodis montri ankaŭ, kiel la du jursistemoj alproksimiĝas unu al la alia, ĉefe, tamen, per la strebado de usona juro al sistemo simila al la dana. En mondo aspiranta al unueco oni emfazu similecojn kaj ne akcentu malsimilecojn por krei el kompara juro kvazaŭ skizaron por estonta mapo de la juro de la tutmondo. Ke ĉi tiu studo por tia mapo estu kontribuo de almenaŭ hezitema linio.

Terminaraj notoj


La verkinto klopodis skribi sian resumon en la internacia lingvo ne kreante neologismojn; ĉiuj radikoj estas laŭ lia scio troveblaj en la Plena Vortaro kun Suplemento. La verkinto ĉi tie deziras esprimi sian sinceran dankon al profesoro Robert L. Wills, Ohio State University, Usono, kiu kritike tralegis la resumon farante valorajn korektojn kaj donante multajn konsilojn. Jen sekvas mallonga listo de anglaj juraj terminoj kun tradukproponoj uzitaj en la teksto:

Promisor, offeror	—	promesanto, ofertanto
promisee, offeree	—	promesricevanto, ofertoricevanto (kelkfoje akceptonto laŭ la senco).
revoke	—	revoki
reject	—	malakcepti
to give notice; notice	—	averti; averto
consideration	—	rekompenco (kontraŭvaloro)
unilateral and bilateral contracts	—	unupromesaj kaj dupromesaj kontraktoj
promissory estoppel	—	promesa ŝtopo (Komparu la duan sencon de »ŝtopi« en Plena Vortaro)
enforceable	—	postulebla aŭ plenumenda laŭ la senco
instalment purchase	—	»ŝeriopaga aĉeto« ŝajnas pli logika ol »partopaga aĉeto«, ĉar tiu lasta ja povus esti aĉeto, kiun oni ne tute sed nur parte pagas.

PLUTONO: LA PLEJ EKSTERA PLANEDO

de Patrick Moore

(El la »Listener« de la 29-a de marto 1962, kun permeso de la verkinto kaj de la redaktoro, tradukita de T. L. C. Bluett.)



Plutono, la naŭa planedo, kaj la plej malprokisma membro de la suna sistemo, ne estas videbla per senteleskopa okulo, aŭ eĉ per malgranda teleskopo; ĝi estas treege malhela, kaj eĉ kiam oni ĝin observas per la plej grandaj reflektaj teleskopoj

en la mondo, ĝi ne ŝajnas io pli grava ol malhela, flaveta stelo. Tamen, kvankam, ĝi estas ne facile rimarkebla, Plutono ricevis de astronomoj multe da atento. Konstante ek de la tempo, kiam oni ĝin eltrovis en la jaro 1930, ĝi prezentis enigmon post enigmo, kaj eĉ nuntempe ĝia efektiva naturo restas treege necerta.

Kvin planedoj (Merkuro, Venuso, Marso, Jupitero kaj Saturno) estas konataj, kaj ĉiuj estas brilaj astroj facile videblaj per senteleskopa okulo. Ĉi tiuj planedoj, kune kun la Suno kaj la Luno konsistigas tutajon de sep astroj de la Suna Sistemo; kaj ĉar sep estis la magia nombro de la antikvuloj, oni konsideris la sistemon kompleta. Do oni miris, kiam en la jaro 1781 la tiam nekonata Hanovera amatora astronomo loĝanta en Anglujo *William Herschell*, eltrovis novan planedon, kiun oni nuntempe konas per la nomo Urano. Kvankam Urano estas giganto, kun diametro de ĉirkaŭ 30.000 mejloj (48.000 km), ĝi estas nur apenaŭ videbla per senteleskopa okulo.

Post ne longe evidentiĝis, ke Urano moviĝas en neatendita maniero. Ŝajnas, kvazaŭ la nekonata forto tiras ĝin el la antaŭdirita pozicio kaj iu postro *T. J. Hussey* sugestis, ke la kaŭzo eble estas alia planedo, vojaĝanta ĉirkaŭ la Suno je distanco eĉ pli granda. Studento en Cambridge *J. C. Adams* kaj Franca astronomo *U. J. J. Le Verrier* sendepende enterprenis sin okupi pri la afero. La rezultoj de iliaj esploroj estis preskaŭ identaj; bazintaj iliajn kalkulojn sur la devojiĝoj de Urano ili eltrovis kie la nova planedo devus troviĝi. En la jaro 1846 *Gal-*